

Numero: 329.  
Oktobro 2019.

27-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Kial kontraŭ Esperanto?

Kiam Esperanto naskiĝis en 1887 d-ro Zamenhof ege esperis, ke lia lingvo fariĝos vaste uzata sur la tuta terglobo post cent jaroj.

Fakte la Internacia Lingvo vivas ankoraŭ en la dudek unua jarcento kaj ĝi havas multajn, favorajn adeptojn preskaŭ en ĉiuj landoj.

Sed mi ne estas kontenta pro ĝia disvastiĝo ĉefe en Hungario.

Mi scias, nun multaj homoj diras, ja la zamenhofa lingvo estas akceptita ankaŭ oficiale. Per ĝia helpo multaj altlernejoj aŭ universitanoj ricevas diplomon. (En Hungario nur tiu ricevas diplomon, kiu havas ŝtatan lingvoekzamenon el iu fremda lingvo. Inter ili estas ankaŭ Esperanto.) En ĉiu jaro miloj lernas ĝin kaj poste ili ekzameniĝas.

Sed kio okazas poste. Tiuj ĉi personoj forlasas Esperanton kaj plu ilin ne interesas la lingvo. En la vivo ili neniam uzas ĝin. Ili ne interesiĝas pri ĝi en estonto. Ili ne faras kontaktojn kun eksterlandaj geesperantistoj.

Nur kelkaj eta procento de la lernantoj fariĝas esperantisto.

Mi spertis multfoje, ke institutoj, lernejoj aŭ aliaj organoj priridas, primokas Esperanton, kvazaŭ ĝi estus nur bagatela infanludilo, kaj kiam oni mencias la lingvolernadon, tiam oni forbalaias tiun ĉi grandiozan eblon por solvi la surdmutan situacion en internacia rilato.

Ofte ili argumentas, la naciaj lingvoj estas pli bonaj, ĉar ilin lernas, parolas amasoj.

Tiuj ĉi kontraŭantoj de Esperanto ne scias, la lingvoinstruado estus pli efika, se unue oni instruas Esperanton unu aŭ du jarojn kaj poste estus komencita la instruado de iu nacia lingvo.

Bedaŭrinde en Hungario Esperanto estas atakita pro stultaj politikaj aferoj. Tion ĉi hungaroj bone scias. En nia lando ofte estas menciita la nomo de Georgo SOROS (ŝoroŝ). Oni citas falsaĵojn, kiuj ŝajnigas Esperanton en malbona lumo. Lia patro TIVADAR SOROS estis esperantisto.

La malamikoj de nia lingvo devas scii, ESPERANTO estas ĈIES LINGVO. Kiu ajn rajtas uzi ĝin.

Oni ne disvastigu tian novaĵon, kiu havas nenian realaĵon.

Inter la esperantistoj estas katolikoj, luteranoj, judoj, budhistoj, ateistoj ktp. Do, ĝi estas kolorriĉa lingvo kaj oni povas/povus uzi ĝin por kia ajn celo.

— Redaktanto —



## Knabeto

Estis varma somero. La knabeto sidis sub granda arbo kaj li lernis.

Kion li lernis en la somera, lerneja ferio? La aliaj geknaboj feliĉe ludis ĉe la riverbordo. Ili naĝis, baniĝis en la malvarmeta akvo. Ilia gaja rido kaj kriado aŭdiĝis al la granda arbo.

Kial lerni dum tiu ĉi varmega tago, kiam la rivero allogas ĉiujn?

Li devis lerni lingvon. Fremdan lingvon. En aŭgusto li vojaĝos kun sia familio al Grekio.

Hodiaŭ li devis lerni ducent novajn vortojn. Liaj gepatroj ordonis tion ĉi al la knabeto.

Laŭ lia patro oni perdiĝos en la mondo sen lingvoscio. Verdire ankaŭ li ne ŝatis lerni fremdan lingvon en la lernejo. Lia lingvoscio egalas al nulo. Tamen li devigas, ke la knabeto ellernu almenaŭ ducent novajn vortojn ĉiutage.

Anstataŭ naĝado kaj sunumado li lernas, lernadas diligente fremdan lingvon, kion lia patro elektis por li.

— Fileto mia, tiu ĉi lingvo estos tre utila dum nia feriado en Grekio — diris la patro serioze — Ankaŭ la filo de mia ĉefo lernis ĝin pasintjare, kiam ili vojaĝis al Grekio. Ĝi estas mondlingvo kaj ĝin oni parolas kaj komprenas en ĉiuj landoj. Do, ankaŭ vi ellernos ĝin ĉi somere.

— Paĉjo, lernu ankaŭ vi! — la knabeto proponis al sia patro. — ni lernu kune, eĉ la lingvolernadon ni proponu al la panjo. Ĉu bone?

— Ho, fileto mia, ni ne havas tempon! De mateno ĝis malfrua vespero ni devas labori. Ja, vi scias. Vi jam estas granda knabo. Vi estos nia interpretisto en Grekio.

Tio ĉi ne tro ĝojigis la knabeton. Li rigardis al sia patro iomete kolere kaj poste li demandis:

— Kial ne devigis vin lerni fremdajn lingvojn via patro? Ĉiam mi devas esti eminenta. Min jam tedas la lingvolernado. Mi lernas dum la tuta somero kaj fine neniu komprenos nin

— Ne protestu! Lernu la lingvon! Ĉu tio ĉi estas granda peto al vi? Se mi havus someran ferion, mi volonte lernus fremdajn lingvojn. Vi, kiel infano via tasko estas la lernado.

— Se mi estos plenaĝa, mi eltrovos pli facilan lingvon por ke la infanoj ne devus lerni en la somera ferio.

— Ŝaŝa —





# István Örkény

## En la halo de la scienco

Juna virino malsaniĝis dum ŝi purigis la kuproklinton de la fenestro antaŭ la tiel nomata Ruĝa Pluso Ĉambrego de Hungara Scienca Akademio. Ŝi konvulsiiis, el ŝia buŝo eliĝis ŝaŭmo, kaj ĝuste ŝi batis sian kapon al la planko, kiam el la Ruĝa Pluso Ĉambrego elverŝiĝis tiu centsepedk kuracistoj, kiuj aŭskultis la prelegon de Gunnar Ingridsson Nobel - premiita biologo.

La hungaraj sciencistoj miris, komencis kuradi, ili eksperimentis per diversaj medikamentoj, estis alvokita la ambulanco, eĉ ankaŭ la fajrobrigadanoj, ĉar ili volis prui ĉion por la eksterlanda famulo – ŝi estis elpendigita tra la fenestro por ke la malsanulino resaniĝu. (Eble en ŝiajn pulmojn enpenetris ŝtoneto.) Sed la virino nur jetriĝadis, ŝi kraĉis la ŝaŭmon, kaj dentogrincis, ĝis Gunnar Ingridsson ekparolis:

— Kial vi ne donas al ŝi glason da akvo?

Neniu pensis pri tio. Vidu, de la akvo la virino rekonsciiĝis, trankviliĝis kaj kontente ŝi daŭrigis la fenestropurigadon.

Tiam ekaperis tuj la raportistoj de la televido, kiuj starigis al la kamero la Nobel-premiiton kun duonglaso da akvo. Oni petis la virinon, ke ankoraŭfoje ŝi jetadu sin kaj ŝi klopodu fari ŝaŭmon en la buŝo, kiu sukcesis.


Bedaŭrinde duafoje la konvolsiojn oni ne povis mildigi, el la virino fluegis la ŝaŭmo, kvankam la granda sciencisto trinkigis la restintan akvon, eĉ li petis ankaŭ glason da sodakvo, sed ĝi estis senefika. Kiu komprenas ĝin?



## Senmorteco

Jam ĝi ne estis juna, sed ankoraŭ ĝi havis sufiĉe da forto, la loĝantoj de la kanaro konis kaj timis ĝin, eĉ ankaŭ trans tio, en la proksimo – foro ĉiuj kvarpieduloj. Ĝia vido ne malboniĝis el la alto je mil metroj ĝi ekvidis la ĉasaĵon kaj ĝi falegis sur ĝin kiel martelo, kiu enbatas la najlon per unu bato.

Kaj tiel dum ĝia floranta aĝo, inter du flugilomovoj neatendite haltis ĝia koro. Sed nek la leporoj nek la zizeloj, nek la kortobirdoj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj kuraĝis elveni, ĉar ĝi ŝvebas tie en alteco je mil metroj etenditaj flugiloj en timiga senmoveco transvivante la morton ankoraŭ dum du aŭ tri minutoj ĝis la vento ĉesis.



## Niaj filoj

Iam estis malfeliĉa vidvino, kaj tiu virino havis du belstatuajn filojn. La pli aĝa filo eklaboris en ŝipo, kies unua veturo kondukis al Pacifiko. Kio okazis al li, nienu scias tion, ĉar li malaperis sur la maroj.

La juna knabo restis hejme. Sed en iu tago, kiam lia patrino sendis lin aĉeti medikamenton en la apoteko, kiu estis en la sepa domo, li ne plu revenis hejmen. Ankaŭ li malaperis por ĉiam.

Tiu ĉi estas okazinta kazo. Sed en la fabeloj la vidvinoj havas tri filojn. Kaj ĉiam la tria filo estas tiu, kiu havas bonŝancon.

— El hungara lingvo tradukis: Apáti Kovács Béla —



# Poezio

## La Majstro mortis.

Julio Baghy.

Ne estis mi tie,  
Preĝante plorpie:  
Katenis min sklave Siberio.  
La famon, ne brue,  
Nur poste, malfrue,  
Simile al eĥo de mortkrio  
Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“

Sed scias mi sente,  
Ke oni sensente  
Plezurojn pelante babiladis,  
Eĉ kiam plorante,  
La ĉerkon portante  
Amaso funebra trapaŝadis.  
Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“

Por ili, jen, homo,  
Eĉ malpli—nur nomo  
Sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko;  
Por ni, funebrantoj,  
Por pacbatalantoj  
Ĝi gardas kreinton de Mondverko.  
Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“



## Julio Baghy Marinjo

Printempa sonĝo estis ŝi por mi,  
knabin' modesta en perkala vesto.  
Al mi donante ŝin la bona Di'  
sunbrilon sendis al la hejma nesto.  
Amoro regis korojn per potenc',  
orumis vivon brila maja suno,  
mokridon sekvis ĉiam kis-atenc',  
dum noktpromen' nin miris eĉ la luno.  
Subite, ho terura sento,  
profete flustris spir' de l' vento:  
"Vintro, se poste venos,  
glacia estos ĝia kis'.  
Vintre la vivo svenos,  
formortos rozo kaj narcis'.  
La vent' deŝiros florpetalojn,  
kaj neĝo kovros boskojn, valojn,  
sub cindro sole fajro en la forn'  
fabelos pri sensonĝa longa dorm'..."

Aŭtune jam aperis ruĝa roz'  
sur vangoj palaj pro turmenta febro.  
La brusto spiron serĉis sen ripoz',  
pupilon kaŝe fermis la palpebro.  
La ftiza tuso skue ĝis sufok'  
el lipoj jetis varman ruĝan sangon,  
kaj sonis al mi lace lasta vok':  
"Lastfoje, kara, kisu mian vangan!"  
Ekstere, ho terura sento,  
profete flustris spir' de l' vento:  
"Vintro, se jaro alvenas,  
glacia estas ĝia kis'.  
Vintre la vivo svenas,  
formortas rozo kaj narcis'.  
La vent' deŝiras florpetalojn,  
kaj neĝo kovras boskojn, valojn,  
sub cindro sole fajro en la forn'  
fabelas pri sensonĝa longa dorm'..."

Forpasis jam somero post somer',  
kaj oni diras: "estis suna brilo."  
Mi kun profunda vundo sen esper'  
atendas vane je la kortrankvilo.  
Por mi ne estas ĝojo en la viv',  
nek flor' printempa, nek sunbrila flamo.  
Ĉe orfa tombo sur la montdekliv'  
mi preĝas plore pri l' entomba amo.  
Riproĉe sonas tra l' silento  
la flustra spir' de l' vaga vento:  
"Vintro, vi kial venis?  
Glacia estas via kis'.  
Vintro, vi vivon prenis  
de ĉiu rozo kaj narcis'!  
La vent' deŝiris florpetalojn,  
kaj neĝo kovris tombojn, valojn,  
sub cindro sole fajro en la forn'  
fabelas pri sensonĝa longa dorm'..."



# Por infanoj



## Cervino kaj Leono

Foje cervino ĉasadis. Nehavante kien kaŝi sin ĝi eniris en la kavon de Leono. Komprenable, la leono tuj kaptis la cervinon dum ĝi kriaĉis agonie`  
 – Mi povra kuregis de homoj kaj jen, sin cedis al sovaĝulo!`

Moral instruo–  
 Kurigante de unu danĝero kiam tiam oni enfalas en pli grandan!`

## Urso kaj Abejoj


Foje Urso kaŝe alproksimiĝis abejoj. Eĉ el unu abejoj Urso forprenis mielĉelaron kaj dolĉe formanĝis ĝin. Alflugis abelo pikante lian buŝon. La urso ekkoleris tiel, ke ĝi prenis la abejoj supren ekĵetante ĝin surteren. Tiam el ĝi eliris ĉiuj abejoj. Ili ĉiuj pikadis la urson, lian buŝon, liajn orelojn, okulojn, unuvorte ĉien ĝi estis pikita sur ĝia korpo  
 .La Urso sin defendis sed vane. Fine ĝi flustris`Ĉu ne estis pli bone elteni la pikon ol revenĝi kaj provoki la tutan abelaron.



## Porinfanaj ŝercoj

- Patrino diris ke la Granda Urso estas sur ĉielo. Mi miris. Ja, panjo kiel sur ĉiel` kiam mi vidis ĝin en la zooĝardeno
- Paĉjo, mia instruistino diris, ke niaj prauloj devenis de simioj.
- Jes, eble la ŝiaj. La miaj certe devenas de Jovanovic –respondis la patro.

## Matematikaj problemoj



- Kara, diru al mi`Vi havas 5 ĉokoladojn kaj vi formanĝos 3. Kiom da ĉokoladoj vi havas nun?`
- Nek unu ! Jes, ne miru ,mi ĉiam formanĝas ĉiujn .
- Bone, vi estas ŝercema. Nun diru al mi, kiom da pomoj estas sur ĉi tablo ?.
- Tri pomoj !
- Kaj kiom da pomoj restos se mi prenos unu el ili.?
- Sufiĉe – ride respondis la infano.

Miriĉ Jadranka Zajeĉar Serbio



# Tempovojažo

# Tempovojažo

